

& Ni laŭdu lin:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 232 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Mondo kaj koro, 1921) "je memortago pri morto de nia Majstro". Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Balado de Virgar, Norda Kantaro #4406.>

(#Melodio:

<:29> (a;Mi /MiLa LaTi TiTi do;re redo doTi TiiMi;Mi LaLa TiTi TiTi do;re redo doTi LaTi;

(#Rekantaĵe: do TiLa So Ti Mi LaTi do do;Mi So SoFa Mi La;Ti doTi La)

)×8)+

(&Strofoj:

'1 Memora fest' ... dolora fest' ! ;
Funebre ni solenas. ; Ho flugis for la
flam' de l' kor' ; ; Ni kiun larme benas.

(×: **Nun emas mi en danco jam iri ;
dum rozoj, lilioj ; kreskadas tre.**)

'2 Nek tondra son' nun de kanon' ; ; Nek
sonoriloj festas, ; Nur batsonor' de nia
kor' ; Pri la solen' atestas.

'3 En vasta mond' malgranda rond' ; Ja
estas nur la fratoj, ; Sed kun potenc',
majesta senc' ; Kuniĝas korobatoj.

'4 Ho kunsonor' de nia kor' ; Funebru la
benatan, ; De kies am' flagranta flam' ;
Kunfandis rondon fratan.

'5 Estingis sin la flam' de l' sin' ; Plu ĝia
varm' ne hardas, ; Sed staras jam
fandaĵ' de l' am' ; Kaj spite frostoj —
ardas.

'6 Ĝin flegu ni, ardegu ĝi, ; Ĝis el
malgranda sfero ; Post vintra frost' la
Pentekost' ; Alvenos al la tero.

'7 Ĝis kun ĝojbril' flamlangoj mil ; Tra
l' tuta mond' disflugas ; Ĝis falas, jen,
la peza ĉen' ; ; Nun kiu langojn jugas.
.....

'8 Ĝis en kompren', eterna ben' ;
Fратиĝos mondo tuta... ; Ni laŭdu Lin,
ke aŭdu nin ; Homaro surdemuta.)